

Franca Esperanto-Instituto Institut Français d'Espéranto

Altaj Studoj 2006

Skriba parto 1 Traduko el Esperanto al la franca lingvo

Daŭro: 2 horoj; /20

Post dudek kvin jaroj da vivo mi nun komprenas, ke mi ne havas eblon esti utila per laboro; miaj psikaj difektoj ne forigeblas; kvankam ili ne ĉiam rimarkeblas, ili malebligas rezultabundan laboron. Laborante, "kreante" ion oni devas fidi sin; kredi, ke la komencita laboro atingos finon, kredi, ke la farata faro estas prava. Mi ne kapablas tion senti.

Mi konscias, ke mi ne estas sola tiaspeca ulo. Mia "tipo" havas longan tradicion. Por pruvi tion sufiĉas citi vortojn de Sandrefo Trafa, nia mondfama poeto :

*Ni ĉiuj lernis ne tro multe:
ion ajn kaj iel ajn.
Pro tio estas tre facile
pompi per klerego-ŝajn'.*

Plue li poemas pri tio, kiel li - junaĝe - ŝajnis sin kompetenta pri historio, ekonomiko kaj antikvaj lingvoj baze de kelkaj krestomatiaj.

Mi konfesas, ke "li" - mi ne scias, kiomprocente tiu lio estas mem Sandrefo Trafa, kiomprocente lia imagito - estas mia plej ŝatata literatura figuro. Mi komprenas la tristan pigrecon kaj envias la tamenan memfidon de tiu heroaĉo.

La bedaŭrinda diferenco inter tiu superfluulo kaj mi estas tio, ke mi ege sentas: sen laboro oni ne rajtas vivi. La breĉon inter mia maldiligento, nelaborivo kaj nelaboremo unuflanke kaj mia emo utili aliflanke, mi decidis ŝtopi provizore per ĉi tiu rakonto pri mi. Mi ne scipovas plani - ĝi ne nepre bezonas planon. Mi timas mensogi kaj erari - miaj firmaj memorenhavoj helpas tion eviti. Skribi, tajpi - al mi ne ŝajnas laboro. Tamen, kiel realero, mia vivo eble helpas planemulojn. Eble ĝi povos esti negativa modelo: kion ne pensu, kion ne timu, kiel estu libera por krei socialismon por viaj gefiloj.

Blazio VAHA, *Adolesko*

Skriba parto 2 Traduko el la franca lingvo al Esperanto.

Beletra teksto :

ALTRADUKO

Durée : 2heures (/20)

Documents autorisés : dictionnaire français-espéranto et Plena Vortaro ou P.I.V.

TRADUIRE UNIQUEMENT LE TEXTE, DE "Ce nom de Gilberte" A LA FIN, SANS L'INTRODUCTION EXPLICATIVE EN ITALIQUE.

Le narrateur adolescent fait la connaissance de la jeune Gilberte Swann. Un jour, il la voit jouer au volant sur "une grande pelouse chétive et rase, jaunie par le soleil", et il entend "une autre" "fillette" crier en s'en allant : "Adieu, Gilberte, je rentre, n'oublie pas que nous venons ce soir chez toi après dîner".

Ce nom de Gilberte passa près de moi, évoquant d'autant plus l'existence de celle qu'il désignait qu'il ne la nommait pas seulement comme un absent dont on parle, mais l'interpellait ; il passa ainsi près de moi, en action pour ainsi dire, avec une puissance qu'accroissait la courbe de son jet et l'approche de son but ; - transportant à son bord, je le sentais, la connaissance, les notions qu'avait de celle à qui il était adressé, non pas moi, mais l'amie qui l'appelait, tout ce que, tandis qu'elle le prononçait, elle revoyait, ou du moins, possédait en mémoire, de leur intimité quotidienne, des visites qu'elles se faisaient l'une à l'autre, et tout cet inconnu encore plus inaccessible et plus douloureux pour moi d'être au contraire si familier et si maniable pour cette fille heureuse qui m'en frôlait sans que j'y puisse pénétrer et le jetait en plein air dans un cri ; - laissant flotter dans l'air l'émanation délicieuse qu'il avait fait se dégager, en les touchant avec précision, de quelques points invisibles de la vie de Mlle Swann, du soir qui allait venir, tel qu'il serait, après dîner, chez elle ; - formant, passager céleste au milieu des enfants et des bonnes, un petit nuage d'une couleur précieuse, pareil à celui qui, bombé au-dessus d'un beau jardin de Poussin, reflète minutieusement, comme un nuage d'opéra plein de chevaux et de chars, quelque apparition de la vie des dieux ; - jetant enfin, sur cette herbe pelée, à l'endroit où elle était un morceau à la fois de la pelouse flétrie et un moment de l'après-midi de la blonde joueuse de volant (qui ne s'arrêta de le lancer et de le rattraper que quand une institutrice à plumet bleu l'eut appelée), une petite bande merveilleuse et couleur d'héliotrope, impalpable comme un reflet et superposée comme un tapis.

Marcel Proust

Skriba parto 3 :

Daŭro: 2 horoj; /20

Por esperantlingva vortaro : artikoloj TEN/I, HOM/O, PREM/I, KIEL, EN

Por franca-esperanta vortaro : artikoloj MAIN, COUP, PASSER, JOUR, À.

Parola parto 1

Teksto komentenda :

40-minuta preparo, klarigo (dum maksimume 30 min) / 20

GENTOJ KAJ LINGVO INTERNACIA 1911

Ĉiuj paroloj pri deveno kaj hereda sango estas nur frazoj kaj pretekstoj, por pravigi niajn sentojn, kiuj efektive havas tute alian bazon. Ni sentas gentan malamon kontraŭ tiu aŭ alia persono ne pro liaj supozataj praavoj, sed nur tial, ke li mem estas fakte fremda por ni per sia lingvo kaj sia religio. Se la gepatra kaj familia lingvo de iu estas la rusa kaj lia religio estas la rusa (grek-ortodoksa), tiam - kia ajn estus lia deveno, kie ajn li loĝus, kian korpan eksterajon li havus - li mem kaj ĉiuj liaj ĉirkaŭantoj vidas en li rusion. Se, kontraŭe, iu eĉ scias tute precize, ke liaj praavoj estis puraj rusoj, sed li mem havas lingvon kaj religion ne rusajn, tiam nek li mem nek aliaj nomas lin ruso. Kompreneble, se iu mem ne naskiĝis kun la lingvo kaj religio de tiu aŭ alia popolo, sed nur poste akceptis ilin, tiam liaj propraj gentaj sentoj kaj la rilatoj de aliaj personoj al li ofte ne povas subite per unu fojo ŝanĝiĝi; sed lia idaro jam plene kaj por ĉiam solviĝas en la dirita gento.

Estas kompreneble, ke ju pli malproksime (geografie kaj etnologie) staras la akceptintoj de fremda lingvo kaj religio, des pli malrapide estos la procedo de la solviĝado; sed la procedo nepre fariĝos, estos nur demando pri la tempo. Se ekzemple en la centra Afriko vivus ia popolo, kiu (ne de hieraŭ, sed jam de cent jaroj, ne en la instruitaj klasoj, sed en la tuta popolo) parolus la lingvon francan (ne kripligitan, sed tute puran) kaj havus tiun saman religion kaj morojn, kiel la plimulto de la metropolaj francoj, - ĉu tiam la francaj naciistoj-ŝovinistoj ne vidus en ili verajn francojn? Multe pli rapide iras la procedo ĉe pli granda geografia kaj etnologia proksimeco. Ekzemple prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hungaroj forgesis por ĉiam la lingvon hungaran kaj komencis paroli nur la lingvon de la germanoj: ĉu en tia okazo post 30 ĝis 40 jaroj ekzistus inter ambaŭ gentoj ia diferenco aŭ genta malamo? Certe ne, ĉar ili por ĉiam fariĝus unu gento. Prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hebreoj decidis forĵeti por ĉiam la hebrean religion kaj akceptis la religion de la popoloj, kiuj ilin ĉirkaŭas; ĉu en tia okazo post 30 ĝis 40 jaroj ekzistus ankoraŭ ia diferenco inter hebreoj kaj ne-hebreoj, ia "hebrea problemo", ia antisemitismo aŭ filosemitismo? Certe ne, ĉar per la ŝanĝo de la religio la tuta tiel nomata "hebrea raso" por ĉiam malaperus. Sekve ne la malsameco de la deveno, kiu estas nur preteksto, sed ne kaŭzo, kreas la gentojn kaj la intergentan malamon.

L. L. ZAMENHOF

Kritika korektado de esperantlingva teksto

Ŝi ja havis kontaktojn kun Skalinski laŭ la socia linio de sia patrino, intima amikino de sinjorino Skalinski. La forpasinta Benjamin vere diris al ŝi ke li fianĉigos ŝin post kiam li absolvos ĉiujn siajn ekzamenojn, sed ŝi mem ne tro atentis tion, ĉar tiu ĉi juna kaj sinpufa knabo neniufanke estis al ŝi simpatia.

Familio Skalinski havis malnovmodan salonon ekipitan laŭ la okdekaj jaroj kun ne travidebla kotona bordoze-ruĝa kurteno kiu estis disŝovata helpe de lignaj radetoj sur kurtentenilo, kaj kiam oni estus disŝovintaj la kurtenon, tiuj ĉi radetoj frapetis unu la alian dampite, lignece kvazaŭ etaj skeletoj. Pro tiu ĉi malagrabra malhela kurteno, pro la malagrabra malluma koridoro, en kiu ĉiam malodoris laŭ spicaro kaj necesejo, pro malhele poluritaj pordoj (kiuj ankoraŭ plifortigis la obskuran kaj malagrablan senton en tiu ĉi malluma loĝejo), kaj precipe pro malbona frambosuko kiu odoris laŭ lavitaj infanvindo, pro tiu ĉi knabo mem, kiu flustris al ŝi maldecajn vortojn, ŝi ŝatis neniam ĉi tiun loĝejon nek tiujn vizitojn, nek sinjorinon Skalinski, nek iun ajn el inter tiuj nesimpatiaj familianoj.

M. Krlĵa, Rande de l'prudento p.72